

**DIA REGNO**  
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (959) • 2023 •

Internacia preĝotago – rete



La virinoj en la pentraĵo sidas apud rivereto, preĝas silente kaj rigardas supren en la mallumon. Malgraŭ la necerteco pri la vojo antaŭen ili scias, ke venis la savo de Kristo. Du endanĝerigitaj specioj estas prezentitaj surbilde: la *Mikado-fazano* kaj la *Orienta plataleo*, kiuj ambaŭ havas unikan signifon por la tajvana popolo. (Pri la preĝotago vidu paĝon 43.)

## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉  
philippe.cousson@sfr.fr

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':  
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

Dek helpoj — pri la Dekalogo	27
Gravaj ĉapitroj el la kultura historio: religioj	31
Trinkakvo — subteno por Prokuroro en Bukavu, DR Kongo	36
Bibliaj Tagoj en Trevero (Trier)	38
Maria Magdalena, sonoriloj en Zöblitz preĝejo	40
Internacia virina preĝotago	43
Gratulojn	46
Mia vivo kun Esperanto	47
Krist' Jesuo al ni naskiĝis	48

## Redaktoraj vortoj

**K**ara leganto, kiam vi legas tiujn ĉi liniojn jam pasis la Pasko. Espereble vi havis belajn kaj pensindajn belajn tagojn. Tiu ĉi tempo enhavas multon el la kristana mesaĝo: fine de marto la anonco pri la naskiĝo, la pasko kun la morto kaj fine la resurekto de Kristo. Ĉion vi trovas en la teksto de la dorsflanka kanto *Krist' Jesuo al ni naskiĝis*. Tio estas nia kreda fundamento.

En la teksto ripetiĝas la frazo “kompatu nin”. Jes, ni, la homaro, ni bezonas kompaton. Sed ni ne vidu nur nian propran mizeron kaj sidiĝu kaj petu kompaton. Ankaŭ ni devas kompati tiujn, kiuj troviĝas aŭ vivas en eĉ pli malfeliĉaj situacioj ol ni. Bedaŭrinde multaj troviĝas en malfacilaj viv-kondiĉoj, materie aŭ mense. Pri tio vi povas iom legi en la gazeto. Ĉu mi, ni, povas ion fari por helpi al tiuj, kiuj bezonas ian helpon?

# Dek helpoj — pri la Dekalogo

Kvara ordono — La laboro kaj la ripozo de kristana homo

József FARKAS, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj, tradukitaj de Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU


*Memoru pri la tago sabata, ke vi tenu ĝin sankta. Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio; faru nenian laboron, nek vi, nek via filo, nek via filino, nek via sklavo, nek via sklavino, nek via bruto, nek via fremdulo, kiu estas inter viaj pordegoj; ĉar dum ses tagoj la Eternulo kreis la ĉielon kaj la teron, la maron, kaj ĉion, kio estas en ili, sed en la sepa tago Li ripozis. Tial la Eternulo benis la tagon sabatan kaj sanktigis ĝin.*

Eliro, 2a libro de Moseo 20,8–11

Rimarko: la citaĵoj el la Nova Testamento estas laŭ traduko de Gerrit Berveling (notita per GB). Por vidi nuancojn vi komparu kun la traduko de nia kutima Biblio, tradukita de Brita kaj Alilanda Biblia Societo.

**E**stas problemoj per ambaŭ: homo povas nek labori nek ripozi laŭ la volo de Dio. Aŭ pli simple: homo ne povas sane labori kaj sane ripozi. Kiam la homo apartiĝis de Dio, la homo perdis la Dian Ordon, kaj kun ĝi ankaŭ perdis la Vivon. De tiam en la laboro ne estas vera beno kaj ĝojo, kaj la ripozo ne donas veran pacon kaj refreŝigon. La du estas tiel interplektitaj, ke oni ne povas instrui homon labori kaj ripozi aparte. Unue vi devas lerni bone labori, por ke vi poste povu bone ripozi. Ne eblas nur bone labori kaj neglekti la tagon de ripozo kaj refreŝigo.

Ne povas esti dubo, ke la Biblio staras apud la laboro kaj kontraŭ la maldiligenteco, mallaboremeco kaj malŝparo. Multaj homoj kredas, ke socialistoj inventis ĉi tiun frazon: “Kiu ne volas labori, tiu ne



Ágnes Ráczkevy-Eötvös prelegante dum kongreso en Legnica. Fotis B.O. Áradsson.

manĝu”. Kvankam ili citas el la Biblio. Tiu ĉi frazo estas en la dua letero de Paŭlo al la Tesalonikanoj (3,10; GB). Sed la homon ĉirkaŭas ne nur la tento de maldiligenteco, sed ankaŭ la tento de laboro. Ni povas diri per teologiaj terminoj: ekzistas ankaŭ demono de la laboro. Same kiel mono, potenco kaj korpo havas demonismon, same ankaŭ laboro havas demonon, kio signifas, ke laboro sorbas homon. Kontraŭ tio Biblio diras: laboru dum ses tagoj, kaj dum la sepa tago ripozu! La Biblio subtenas kaj laboron kaj legitiman, meritan ripozon.

Kiam Biblio parolas pri laboro, unuflanke ĝi rigardas malantaŭen al la kreado, aliflanke ĝi rigardas antaŭen al la nova kreaĵo, al elaĉeto. Tio signifas pri la laboro, ke vi estas nur estaĵo en la mondo, vi nur eniris la mondon, kiun Dio kreis. Vi estas kunlaboranto de Dio, sed Dio iras antaŭ vi, Dio laboras antaŭ vi. Dio montras antaŭen pri la savado kaj diras: “Homo, ne vi savas la mondon: Dio elaĉetis ĝin, kaj Li kunportas novan ĉielon kaj novan teron. Vi povas aliĝi al la servo de la sava laboro de Dio.”

Tio estas la digno de homo, ke li povas labori kaj povas ĉesi laboron kaj povas ripozi. Kie ĉi tiuj du ne estas en harmonio, tie ne ekzistas homa digno.

La 127a psalmo en la unuaj du versikloj nedubable atestas pri tio, kiel la Biblio pensas pri laboro kaj Dio:

*Se la Eternulo ne konstruas la domon,  
Tiam vane laboras super ĝi ĝiaj konstruantoj;*

*Se la Eternulo ne gardas urbon,  
Tiam vane maldormas la gardanto.  
Vane vi frue leviĝas, malfrue sidas,*

*Manĝas panon kun klopodoj:  
Al Sia amato Li donas en dormo.*

Mi esperas, ke ne necesas klarigi, ke la psalmisto ne parolas kontraŭ la laboro. Ĉi tiuj versikloj temas pri tio, ke se io mankas en la laboro – kion ni diras per bibliaj terminoj, ke tio estas la beno de Dio –, do se ne estas iu aprobo desupre, tiam homo povas eĉ kolapsi en ĝi, la homa laboro ne havos rezulton. La Biblio do ne nur scias pri laboro, sed ankaŭ scias, ke laboro troviĝas en la amo aŭ juĝo de Dio. Kaj labori kontraŭ la juĝo de Dio estas vana. La beno de Dio estas necesa por laboro. Ni memoru la historion de la kreado: Dio benis kaj sanktigis la sepan tagon. La ripozantan homon, kiu turnas sin al Dio, kiu meditas, pensadas kaj serĉas la veron – tiun homon Dio benas, por ke la laboro estu efika kaj fruktodona.

Sur la fasado de la kolegio en la hungara urbo, Debrecen oni povas legi: “Ora et labora”: preĝu kaj laboru! La homo estos benita en ĉi tiu duobla unueco, pro tio ni devas lerni ripozi en la sepa tago, por ke nia laboro estu vere benita en la venontaj ses tagoj. Ni komprenu bone denove: la Dek Ordonoj estis donitaj de Dio pro la homo. Homo fariĝas homo, se li laboras, poste haltas kaj pensadas kaj ripozas, poste denove laboras, denove pensadas, staras antaŭ Dion. Homo vivas ne nur per pano, sed per ĉiu Vorto, kiu venas el la buŝo de Dio. Ni vivas kaj per pano kaj per la Vorto. Kaj kiu bone vivas per ĉi tiuj du specoj de pano, tiu atingas plenan homan vivon. Kiam mi parolas pri sanktigo de la sepa

tago, mi ne rigardas la demandon el la vidpunkto de Dio, ke kion oni devas doni al Dio en la sepa tago. Sed mi rigardas el la vidpunkto de la homo: kion bezonas la homo? Kial devas sanktigi la sepan tagon? Kio okazas al tiu homo, kiu bone sanktigas la sepan tagon?

Mi trovis simplan vortumon: ni prenas benzinon de supro. Ni prenas benzinon, sed ne de malsupre, ne de homa benzin-stacio, sed de supro. Ni bezonas ĉi tion ankaŭ dum la ses tagoj, sed Dio ordonis unu tagon por ke ni ripozu de niaj aferoj, reŝargu nin kaj tiel ni iru reen en nian vivon. Kio estas la sanktigo de la sepa tago? Pleniĝi per ĉielaj fortoj. Tiu ĉi frazo konfirmas tion, kion Jesuo diris al la fariseoj, kiuj volis rigardi la sabaton el la vidpunkto de la gloro de Dio, kaj diris: en sabato oni ne eltiru beston el kavono, oni ankaŭ ne rajtas helpi al homo, ĉar la gloro de Dio estas pli granda. Jesuo diris: “Estas ja permesate fari bonon en la sabato, ĉar la sabato estas por la homo, ne homo por la sabato.” Dio donis al ni la sabaton kiel donacon kaj ne kiel severan leĝon, por ke ni ne perdu nian homan dignon, por ke ni povu vivi harmonian, riĉan vivon.

Estas tre interese kiom multe ankaŭ la korpo predikas ĉi-rilate. Biologoj diras, ke ni uzas energion al la vivo dumtage kaj reŝargiĝas nokte. Hodiaŭ kuracistoj rigardas la nervan sistemon tiel, ke ĉiu nerva ĉelo estas kvazaŭ malgranda elektra sistemo, malgranda baterio, kiu estas ŝargita per neŭro-elektra ŝargo, kaj tage, kiam ni laboras, koleriĝas kaj laciĝas, la baterio elĉerpiĝas, ni foruzas la energion. Ĝi iomete reŝargas nokte,

sed ne tiom, kiom ni uzis dumtage. Do ankaŭ fiziologie estas pravigita la sepa tago, por ke la mirindaj malgrandaj baterioj estu reŝargiĝitaj, por ke la korpo estu reŝargiĝita, kaj en la sekvonta semajno denove komenciĝu la malŝpar-ema sinteno, ke ĉiutage ni eldonas pli ol ni enprenas. La korpo predikas. Esploru vian nervan sistemon: la leĝo de la sepa tago estas skribita en ĝi. Nerva elĉerpiĝo, kverelo, alta sangopremo, kaj finfine vi estos tute nekapabla labori. Jen la biologia signifo de la sanktigado de la sepa tago.

Sed okazas same mense. Dum la Diservo niaj koroj pleniĝas per bonvolo, fido, amo kaj pardono, kaj ni decidis vivi kiel Dio instruas nin. Ĉu vi ne sentas, ke ankaŭ ĉi tiuj spiritaj baterioj malpleniĝas? Nia fido elĉerpiĝas kaj ni devas iri al Dio por ke ni denove estu replenigitaj. La sanktigo de la sepa tago ne estas religia devo, sed regulo de vivo. Regulo de vivo kiu povas esti spertita spirite kaj povas esti pravigita biologie.

La sanktigado de la sepa tago estas, unuflanke, malstreĉiĝi de krampoj, kaj aliflanke, ni estas plenigitaj de fortoj kiuj donas elanon al la laboro de la sekvonta semajno. Kion signifas malstreĉiĝi? Mi respondos ĉi tiun demandon per tri frazoj.

1. *Ni devas esti liberigitaj de la sklaveco de la laboro.*

Troviĝas homoj, kiuj ne povas halti, kiuj estas en eterna moviĝo. Ni devas eliri el ĝi. La mondo estos en ordo eĉ se ni ĉesos labori dimanĉe.

2. *Liberiĝi de la sorĉo de mono.*

Kristana homo devas pripensi: ĉu mi

devas kuri kun la aliaj por havi tion kaj tion kaj tion? Troviĝas luktantaj, malriĉaj homoj, kiuj vere devas batali por ĉiutaga pano. Ili estu respektataj, kaj hontu tiu socio, en kiu vi ne povas gajni decan panon per ses-taga laboro. Ne ĉiam tiuj, kiuj laboras sep tagojn, estas kulpaj. Sed se ni deprenas ĉi tiujn homojn, restas homamaso, kiu falis sub la sorĉon de mono kaj diras: mi povas pli multe gajni dimanĉe, ili pagos al mi pli, kaj mi volas tion.

3. *Vi devas malstreĉiĝi de maltrankvilo.* Fini la senpaŭzan maltrankvilon: kio okazos al la familio, kio okazos al la apartamento, se mi ne laboros dimanĉe.

Por sanktigi la sepan tagon bezonas, ke ni ne estu sklavoj de laboro, mono kaj zorgo. Kiel Sinjoro Jesuo Kristo instruas al ni: “Sed kiu el vi kapablas per siaj zorgoj aldoni al sia aĝo eĉ ulnon?” (Mateo 6, 27; GB)

Ne maltrankviliĝu: tio apartenas al la sanktigado de la sepa tago. Laŭ mia sperto, sanktigi dimanĉon implicas tri aferojn: pensi, preĝi kaj ludi.

- a.) Por reŝargiĝi dimanĉe, mi unue devas pensadi pri miaj propraj aferoj. Mi devas pripensi la pasintan semajnon, la direkton de mia vivo. La sanktigo de la sepa tago tiel okazas, ke mi alfrontas min mem, farante bilancon de miaj aferoj.

- b.) La dua estas preĝado. Tio signifas, ke dum mia pensado mi ne restas nur en

mia propra rondo, sed mi ankaŭ petas la lumon de Dio. Mi petas ankaŭ pardonon pro la mizeroj de la pasinta semajno, per kiuj mi malgajigis Dion kaj vundis homojn. Mi petas vidkapablon por bone kompreni mian vivon, mi petas la forton de la Sankta Spirito por plenigi mian vivon per nova vigleco, ĝojo kaj volo.

- c.) La tria estas la ludo. Mi asertas, ke la kristana homo devas lerni ĉi tiun formon de malstreĉiĝo kaj reŝargiĝo, ke ni gaje, libere, ludeme kunestus tiel, ke novaj ĝojoj plenigas niajn animojn.

Multaj kristanoj opinias, ke la sanktigo de la dimanĉo konsistas ekskluzive el preĝo. Kaj mi asertas, ke sanktigi dimanĉon estas en la bela kombino de ĉi tiuj tri: renkonti min mem, serĉi Dion en preĝado kaj esti en bela, liberigita rilato kun alia persono.

Jen mia interpreto pri la sanktigado de la sepa tago. Ni liberiĝas de la konvulsioj de laboro kaj mono, kaj per meditado, per preĝo kaj per ludanta kunestado ni reŝargiĝas per novaj fortoj.

En la letero al la Hebreoj Paŭlo parolas pri la ripoztago (4,9–11; GB):

*Do rezultas <ankoraŭ> sabatismo por la popolo de Dio. Kiu ja eniras en Lian ripozejon, mem ankaŭ ripozos de liaj faroj, kiel Dio de la Sijaj. Ni do klopodu por eniri en Lian ripozejon...*

La popolo de Dio havas sabaton, kaj ĝi estas nek la juda sabato nek la kristana dimanĉo. La signifo de ĉi tiu versiklo estas, ke nia tuta vivmaniero estas la

trankvilo, estas la vivmaniero de la ripozo de Dio. Ĝis ni ne ekkonis nian Ĉielan Patron en Kristo, ni estis nervozaj, ni havis antikvan, grandan maltrankvilon kaj timon, kaj ĉi tio pelis nin en labortagoj kaj dimanĉoj. Kiam ni ricevis la savadon – diras ĉi tiu letero –, ni eniris la ripozon de Dio, kaj ni trankviliĝis. Dio estas mia patro, mi ne devas timi, mian vivon ne tenas miaj du manoj, ne mia laboro savas la mondon. La savita homo eniras la ripozon de Dio. Por ni ne la sabato estas festo, ne la dimanĉo estas festo, sed nia tuta vivo estas festa ripozo de Dio.

Nia tuta vivo trankviliĝis de timo kaj ĉasado, ni vivas festan, elaĉetitan vivon. Kiam ni laboras dum ses tagoj, tio ankaŭ

estas adoro. Ĉar mi estas en la domo de mia Patro, kaj mi rigardas mian Patron, kaj mi laboras en obeado al Li dum ses tagoj. Mian tutan vivon plenigas la trankvilo, ke Dio prenis mian vivon en Siajn manojn. Kies tuta vivo trankviliĝis en Dio, tiu povas bele pasigi la sepan tagon.

Plenumi ĉi tiun ordonon eblas nur en Jesuo Kristo. Mia vivo trankviliĝas en Jesuo Kristo. Mi estas pekulo, inda je juĝo, kun malpura koro, sed mi estas infano de Dio. Dio amas min, Li prenis mian vivon en Siajn manojn, Li purigas min. Mi eniras en la pacon de Dio, mi laboras en ĉi tiu trankvilo, kaj tiel mia vivo pleniĝas per novaj fortoj.



---

## Gravaj ĉapitroj el la kultura historio: religioj

Enkonduko al Antologio Latina

Gerrit BERVELING, NL

Por multaj nuntempaj homoj, certe por tiuj el la ne-Eŭropaj kulturoj, sed ankaŭ por multe da eŭropanoj (kaj nord-amerikanoj) kiuj ne plu estas kristane edukitaj, povas iom fremdige efiki, se en nia ANTOLOGIO LATINA ĉi tie ni enŝovas sufiĉe detalan ĉapitron pri teologiaj demandoj. Se tio okazos en volumoj, kiuj traktas la Mezepokon, tion oni certe pardonos al ni, sed ĉi tie... nu, oni eble iom hezitos.

Por klarigi, mi povas substreki, ke en la nun traktata periodo certasence *form-*

*iĝis* la kristana tradicio. Ĝis tiam ĝi ankoraŭ estis sufiĉe senkohera kaj varia<sup>1</sup>, sed en tiuj ĉi jarcentoj unueciĝis kaj la eklezia strukturo kaj la doktrina ortodokseco. Kaj kiel sciante, ĝuste la kombino de la greka-romia heredaĵo kaj la juda-kristana tradicio kune formas la bazon de nia nuna eŭropa kulturo.

Tial estas utile iom detale trakti, kiel estiĝis tiu kristana tradicio.

Unue, kristanismo estas religie pluralisma movado, kiu estiĝis kiel reago al la agado de Jesuo de Nazaret kiel Mesio –

aŭ greke: Kristo<sup>2</sup>, kaj de ties lernintoj. Tiu movado, en kiu ajn konkreta formo ni renkontas ĝin, sin mem kutime nomas *Eklezio*. Por ni nunuloj estas memkompreneble, ke ĝin formis la kristana Biblio, kiu – kontraste kun la Juda Biblio<sup>3</sup> – konsistas el du partoj: la Olda Testamento kaj la Nova Testamento<sup>4</sup>. Sed ĉi tie por multaj finiĝas la scio. Tamen, ne estas *aŭtomate* vera, ke la Biblio konsistas el O.T. plus N.T., ĉar ja ekzistis sufiĉe fortaj tendencoj interne de la frua kristanismo, kiuj strebis elimini la Oldan Testamento. La fruaj kristanoj parte estis ankoraŭ de Juda deveno, sed tre baldaŭ – kaj decidige! – superregis la novkonvertitoj el la ceteraj popoloj (la gojoj). Kaj legante la Biblion, tiuj ĉi laste menciitaj ofte havis kiel grandan problemon, ke unuavide en la Olda Testamento renkontiĝas iu Dio, kiu estas sufiĉe naciisma, kiu ordonas mortigi la malamikojn de la Hebreoj, eĉ ekstermi tutajn urbojn da ili, dum en la Nova Testamento, en la Patro de Jesuo ili precipe vidis Dion plenan je amo kaj kompatemo. Do, laŭ pluraj, tio devas esti du malsamaj Dioj. Kaj ĉar la Dion de Jesuo oni intencis sekvi, la alian oni ne povas akcepti samtempe.

Precipe kristanaj gnostikuloj (Gnostiko venas de la vorto *gnosis*<sup>5</sup>) estis tre radikalaj tiuteme.

**Marciono** fariĝis la plej fama inter ili. Li devenis el Ponto (ĉe la Nigra Maro) kaj depost la jaro 144 kontraŭbatalis la katolikan formon de kristanismo. Laŭ li ĝi estis “Jude infektita”, kompare kun la origina movado de Jesuo. La antagonismon inter *Torao* kaj *Evangelio*, kiun kelkfoje eblas konstati ĉe Paŭlo, li

kulminigis, kaj la Toraon – fakte la tutan Oldan Testamento – li komplete malakceptis, ĉar ĝi estis liajuĝe la libro de la “kontraŭ-Dio” kiu kreis ĉi tiun mondon. Laŭ Marciono, Jesuo per kompleta pardono de ĉiuj pekaj estis turninta sin kontraŭ la Dio de l’ Olda Testamento, kaj sekve ankaŭ kontraŭ ĉi tiu mankohave kreita mondo nia. Tial li metis grandan emfazon sur askezo. El la Nova Testamento nur la leterojn de Paŭlo li akceptis kaj la evangelion laŭ Luko<sup>7</sup>, kiun li konsideris disĉiplo – lerninto – de Paŭlo. Marciono per sia kritiko fakte “inventis” la unuan kanonon de l’ Nova Testamento.

La eklezio, kiun fondis Marciono, rapide kvazaŭ konkurenco disvastiĝis apud la “katolika” movado kaj pluekstis ĝis en la 4a jc. Multaj ĝiaj anoj mortis martire. Fine ĝiaj restaĵoj kunkreskis kun la Maniĥeoj.

**Montanismo** estas kristana movado, kiu estiĝis en la 2a jc, dank’ al la predikado de Montano kaj la profetinoj Priska kaj Maksimila, unue en Frigio (nuna Turkio) sed baldaŭ tra tuta la Romia Imperio. Karakteriza por la movado estis granda religia entuziasmo kaj apokalipsa atendado de baldaŭa mondo-fino. Ili ofte parolis glosolalie<sup>8</sup> kaj vivis askete. Interne de la movado oni baldaŭ konsideris Montanon kiel la de Jesuo promesitan Parakleton (Joh. 14, 16)<sup>9</sup>.

Tertuliano estas la plej konata persono, kiu en certa periodo de sia vivo apartenis al la movado<sup>10</sup>.

**Valentino** (naskita ĉ. 100 en Egiptio) laboris meze de la 2a jc (ĉ. 135–160/65) en Romo. Laŭdire tiu ĉi fama gnostika



gvidanto unue esperis fariĝi la nova tiea episkopo (papo), sed kiam post la elekto de Pio la Ia tio montriĝis neebla, li multe pli detaligis siajn kosmologie-mistikajn instruojn pri gnostiko. Lia movado nomiĝas la Valentinanoj.

Multaj fakuloj estas konvinkitaj, ke la *Evangelio de la Vero*, kiun en 1945 oni retrovis en traduko inter la Kopta biblioteko<sup>11</sup> de Nag Hammadi, Egiptio, estas lia verko. Ĝis tiam pri ĉi tiu gnostika branĉo oni nur sciis, kion skribas kontraŭuloj.

## Gnostiko

Plurfoje ni jam uzis la vorton *Gnostiko*. Eble ni iom traktu ĝin: Gnostiko estas religie orientita pensmaniero, kiu ekde la 2a jc p.Kr. disvastiĝis en kaj ankaŭ ekster la Romia Imperio. Iel eblas rigardi ĝin unu el la rezultoj de l' kultura renkontiĝo Helenisma, en kiu kontaktiĝis la Greka (=Helena) kulturo kaj la Mezorianta mondo. Se rigardi la Grekan flankon, certe gravas la filozofio, precipe Platonismo, kaj orfismo (malnova sufiĉe mistike orientita religio, kies heroo estis Orfeo). Ankaŭ troviĝas gravaj radikoj de gnostiko en la praa Persio.

Ekzistis pluraj gnostikaj sektoj, kelkaj relative proksimaj je kristanismo, kiujn la eklezio kontraŭbatalis kiel herezaĵojn; aliaj tendencoj ne havis kristanan flankon. Hermetismo, ekzemple, estas speco de gnostiko kiu rilatas al la religio de l' malnova Egiptio, precipe kun ĝia Dio Thot, Greklingve Hermes. Unu el la plej influaj kristanaj gnostikaj skoloj estis tiu de Valentino.

Laŭ gnostiko, la homo povas atingi saviĝon pere de *gnosis*, ezotera scio. Tiu

scio koncernas la mondon de l' O Dia kaj de la superteraj estaĵoj, sed ĝi ankaŭ liveras komprenon pri la homa ekzisto ĉi-tera, pli rekte pri la homa esenco. Estas dualismo de *spirito* kaj *materio*. La materio estas malpli valora kaj efektive devenas de l' O Malbona. La homo, tamen, dank' al Dia sparko en la interno, estas parenca je Dio, kiun gnostikuloj kutime nomas la Patro. Scio pri Dio tial certasence identas je scio pri sia plej intima memo. La gnostiko estas tre negativa koncerne la konkretan materian mondon: ĉion palpeblan kreis la malbonaj fortoj. La spirito devas liberigi sin el sia ligiteco al la korpo, al la materio. Se iu homo atingas la *scion*, tio estas la spirita resurekto de tiu homo. Kristo estas la instruanto de tiu scio.

Laŭ kelkaj, la homoj dividiĝas en tri grupojn: tiuj homoj, kiuj havas en si la Dian sparkon, kaj kiuj sekve kapablas saviĝi, se scion ili atingas. Due la *hylici*<sup>12</sup>, t.e. la nur-materiaj homoj, al kiuj mankas la spirita bazo por esti savitaj. Ili, se diri simplige, ja ne posedas animon, estas nur eksteraĵo. Kaj trie la t.n. *psychici*<sup>13</sup>, kiuj ja ne atingos la veran *scion*, sed kiuj tamen – farante bonajn agojn – povos atingi certan feliĉecon. Koncerne la ekeston de spirita potencoj, anĝeloj, homoj ktp, la gnostiko ne deiras de iu origina kreado fare de Dio, sed de emaniĝo el Dio. Spirita estaĵo estas emaniĝo el la Patro. La palpebla materia mondo estas kreita ne de la plej alta Dio mem, kiun oni ja ne rajtas respondeciigi pri tiu ĉi neperfekta universo nia, sed de iu malpli supera “Dio”, la Demiurgo<sup>14</sup>.

La spirita estaĵoj, la anĝeloj kaj la

“Diaj sparkoj” interne de l’ homoj (= la animoj) devos liberiĝi el ĉiu ligiteco al la neperfekta, por finfine returniĝi al Dio mem, por ke “Dio estu ĉiu en ĉiuj”.

La gnostiko tre ofte parolas pri la plej supera Dio kiel “la nekonata Dio”, kiu transcendas ĉiun nian komprenon.

La karakterizaĵoj de tiu Dio ofte estas personigitaj en t.n. hipostazoj, la Dia Pensado, la Providenco, ktp. Al tiu “Dia pleroma (kompleteco)” apartenas fakte ankaŭ la Eklezio kaj la Homo. Ĉar laŭ Dia kerno ankaŭ ĉiu homo iel apartenas en Dio.

Kelkaj gnostikaj skoloj havis komplikajn instruojn pri multaj tavoloj da anĝeloj kaj demonoj. Aliaj laboris ankaŭ kun kaŝitaj nomoj aŭ sorĉ-formuloj.

Ĝis en la mezo de l’ 20a jc p.Kr. nia scio pri gnostiko grandparte dependis de la literaturo de kristanaj teologoj, kiuj atakis kaj kondamnis tiun movadon. Ilia prezentado, bedaŭrinde, ne ĉiam estis tre objektiva, kvankam la trovaĵoj de 1945 en Nag Hammadi (Egiptio), kie kompletan gnostikan bibliotekon oni elfosis, pruvis, ke iliaj citaĵoj el gnostikaj tekstoj kutime estis sufiĉe fidindaj.

En la 20-a jc, kiel iaspeca reago, estiĝis eĉ novspeca gnostiko: ie tie fondiĝis gnostikaj eklezioj eĉ kun episkopoj. Tiu ĉi speco de gnostiko ne transprenis la ege negativan sintenon de la frua gnostiko rilate al la homa korpo.

(daŭrigota)

----- Klarigoj

1 Vidu ekzemple la priskribitan diversecon de la plej fruaj komunumoj

kristanaj en *La evangelio laŭ Maria Magdalena*.

- 2 Kristo / Ĥristo = Sanktoleito, same kiel la Hebrea vorto Maŝiaĥ / Grekigite: Mesio. Arabe: Masiĥ, troveblas en Korano.
- 3 TeNaĤ: Torao, Profetoj kaj ceteraj Skriboj. L.L.Zamenhof – kiel Judo / Hebreo, kiel li mem nomis sin – tradukis kompreneble nur tiun Hebrean tekstaron. Li efektive deziregis, ke aperu memstara eldono precipe por la utilo de liaj samgentanoj. Ĝi bedaŭrinde ankoraŭ ne aperis.
- 4 En pluraj volumoj aperis mia nova traduko pri NT kun iom da komentoj: *leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo; La Bona Mesaĝo de Jesuo* en kvar volumetoj *Laŭ Marko / laŭ Mateo / laŭ Luko / laŭ Johano; Flanke je Jesuo*. Ankaŭ la ne-Hebrean parton de *Malnova Testamento* (alivorte *Duakanonaj Libroj* aŭ – protestantece – *Apokrifoj*) mi tradukis el la originalo: *La Duakanonaj Libroj 1 + 2 + 3*.
- 5 La Greka vorto por scio, de kiu devenas la vorto *gnostiko* por la tuta pens-movado.
- 6 *Katolika* estas Greka vorto, kiu signifas *ĝenerala*. Nuntempe en la ĝenerala parol-kutimo oni ofte limigas ĝian signifon al unu eklezio, nome tiu de Romo, la Rom-katolika Eklezio. Sed fakte ekzistas ankoraŭ pluraj specoj de t.n. katolikaj eklezioj. Mi menciui pri ekzemple la Praktolika, la Grek-Ortodoksia Eklezio, kiu estas memstara disde Romo), la Episkopa Katolika, la Libera Katolika k.a. eklezioj.

7 Kvankam, se diri pli detale, elinter la konataj leteroj de Paŭlo li jam distingis inter aŭtentaj kaj ne-aŭtentaj eroj, kiujn lastajn li do malakceptis en sia kanono. El la evangelio laŭ Luko li ankaŭ eliminis plurajn partojn, kiuj por li estis tro Judecaj, ekzemple la naskiĝo-rakontojn pri Jesuo. En la moderna teologio depost la 18a jc multaj liaj temoj revenis.

Por iom resumi, Marciono asertas: 1] la Leĝo Mosea estas sub la homa digno kaj sub la digno de Dio, kiu estas saĝa kaj gracoplena; 2] la Dion, kiu sendis la Mosean Leĝon, ni devas do absolute rifuzi, ĉar obsedas Lin nur justeco (punpagigo kontraste al graco) kaj kiel tia Li malamikas al la homa gento kaj montras sin kreanto de la malbona materia mondo; 3] subite aperis, kiel iu plene nova, Jesuo: tiu malkaŝis novan ĝis tiam nekonatan Dion: la amplenan Patron, kiu kreas spacon, kie la homoj estas liberigataj, kaj elsub la Mosea Leĝo, kaj de la Dio kiu kreis la malbonan mondon; 4] sekve, O.T. kiu atestas pri tiu Dio de l' malbonmonda kreo kaj kiu donis la Mosean Leĝon al Izrael, ne plu validas post Jesuo Kristo; 5] nur kelkaj leteroj de Paŭlo (ĉefe tiu al la Galatoj) kaj reviziita formo de la evangelio laŭ Luko estas akceptindaj por kristanoj.

Por defendi la fakton, ke O.T. kaj N.T. apartenas kune, Tertuliano en sia *Kontraŭ Marciono* montras sin ofte ekstreme kontraŭ-Juda: ke Dio en O.T. punas ĝis tria kaj kvara generacioj, tion Li faras pro la obstino de l' Juda

popolo, en la espero ke almenaŭ kelkaj iliaj idoj saviĝos finfine. La Mosea Leĝo ne estas pruvo de ia dureco de Dio, kiel asertas Marciono, sed nemis-komprenebla signo de Lia subluma amo por venki ilian obstinecon. La Mosean Leĝon oni kompreneble ne plu obeu, sed ne pro ia senvaloreco flanke de ties Dia doninto, sed ĝi estas, kia ĝi estas, nur pro la popolo al kiu ĝi estis destinita. Por Tertuliano, O.T. estas kvazaŭ skandal-plena kroniko pri tio, kiel la Juda popolo daŭre kaj ripete estis malobea al Dio. Kaj por li tio kulminas en N.T. en la mortigo de l' al ili sendita Mesio Jesuo.

- 8 En specialaj revelaciitaj esprimoj kaj lingvoj.
- 9 Tio signifas, ke laŭ la anoj de l' Montanismo ĉe Montano komenciĝis nova stadio en la Savhistorio de la mondo. Simila identigo kiel la *Parakleto* denove pli poste okazis ankaŭ al la profetoj Mani (de l' Maniĥeoj) kaj Muhammad (de Islamo).
- 10 Tertuliano dekomence estis akra kontraŭulo de la movado. Ĉar la etikajn postulojn de la oficiala kristanismo li opiniis ofte tro malstriktaĵ, li fine fariĝis membro de l' asketa Montanismo.
- 11 La plej fama teksto el ĉi biblioteko estas *La evangelio Kopta laŭ Tomaso*.
- 12 De la Greka *hylê* = materio.
- 13 De la Greka *psychê* = animo.
- 14 Laŭlitere: la Manlaboristo, konstruanto.

# Trinkakvo

— subteno por Prokuroro en Bukavu, DR Kongo

Dr. Manfred WESTERMAYER, DE

**F**lanke de nia akvo-projekto en Kalima, ni konatiĝis kun katolika pastro Hubert Mukungilwa. Li nun transprenis paroĥon ProKaMu en Bukavu-Ibanda. Tie ankaŭ estas seminariejo por la distriktaj pastroj kaj loĝejoj por maljuniĝintaj pastroj. Por prizorgi ĉion, tie vivas kaj kunlaboras 8 fratinoj. Hubert skribis, ke ili kaj eĉ pli iliaj najbaroj en la paroĥo havas grandan problemon pri bona trinkakvo. Akvo ja estas, ĉar ili troviĝas je la rando de la Kivu-Lago, sed tiun akvon oni ne devus trinki rekte – sen desinfektado. La ŝtata firmao REGIDESO ne povas instali bonan akvoprovizon. Kaj la urbestro kaj la dioceza episkopo petis subteni ĉi-tiun lokan projekton, kiu provizus ĉ. 1 500 homojn kun salubra trinkakvo. Hubert sendis al ni iliajn dokumentojn kaj kelkajn fotojn. Li verkis planon por prilabori, stoki kaj provizi akvon en du lokoj: en la

konstruaĵoj de la paroĥo kaj por unu kranaro en la centro de la loĝ-kvartalo.

La kostoj estas 14 000 US\$ kun 1 cisterno, prefere 16 000 por instali 2 cisternojn de po 20 kubaj metroj por desinfekti kaj stoki la salubran akvon. La paroĥo pretas partopreni per 10 % de la sumo. Ni jam petis *Cents-for-Help*, de dungitaro de firmao BOSCH, subteni ĉi tiun projekton – ni ricevos la informon en junio. Intertempe ni kolektas inter niaj samideanoj.

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) ĉi-kaze kunlaboras kun KELI kaj IKUE en Germanio por kolekti la mankantan diferencon de 2 ĝis 4 mil \$. Pro formalaj kaŭzoj (akcepti donacojn kiujn akceptos la impost-oficejo) subtenas nin la asocio *Direkthilfe für Kleinprojekte e.V.* en Freiburg/ Breisgau

Strato en Bukavu.



kiu ne rilatas al Esperanto, sed estas ligita kun katolika paroĥo tie.

Se vi loĝas en Eŭropo via donaco al Direkthilfe für Kleinprojekte e.V. en Freiburg povas redukti vian imposton.

Vidu adresojn kaj bankkonton en apuda tekstokadro.

Anticipe koran dankon,  
samideane salutas,  
*Dr. Manfred Westermayer*

**Adreso kaj bankkonto de  
Direkthilfe für Kleinprojekte e.V.:**

Direkthilfe für Kleinprojekte e.V.  
Flauserstr. 1,  
DE-79102 Freiburg, estraranino: M. Thum,  
Volksbank Freiburg,  
IBAN: DE58 6809 0000 0009 4430 02,  
BIC: GENODE61FR1

*Bonvolu noti krom via nomo kaj eble  
adreso, kiel celon de via donaco  
"Kalima – Bukavu".*

**Projekt-Adreso de AVE (eo):**

Dr. Manfred Westermayer,  
Weissdornweg 68,  
DE-53177 Bonn,  
<manfred@westermayer.de>;  
Raportoj pri jamaj projektoj:  
<http://www.verduloj.org/afriko.htm>

**Loka adreso (fr, eo):**


Diocese de Kasongo,  
Père Hubert Mukungilwa Wakusomba,  
Procure de Kasongo a Muhumba,  
kv. Muhumba/Nyalukemba, Bukavu-Ibanda,  
Prov. Sud-Kivu,  
DR Kongo,  
Postadreso: bp 333 Cyangugu/Rwanda  
<hmukungilwa@gmail.com>



Fratulinoj kun Hubert.



Hubert sole.



Projektplano – mapo.

# Bibliaj Tagoj en Trevero (Trier)

8a ĝis 12a de marto 2023

Roland SCHMIDT, DE

**M**i eklernis esperanton en septembro 2022. La bibliaj tagoj en marto 2023 estis mia unua renkontiĝo esperanta, krom kurseto en mia urbo.

Unue, mi miris pri la graveco de tiu renkontiĝo por la partoprenantoj. Kelkaj akceptis longegan vojaĝon, aliaj vojaĝis longe malgraŭ handikapo. Ili ĝojegis revidi unu la alian, ĉar, pro la pandemio, la bibliaj tagoj 2020 okazis per filmeto, kaj en 2021 kaj 2022 per retaj kunvenoj.

Ni loĝis en la junulargastejo de Trevero (Trier). Tie, ni havis matenmanĝon, tagmanĝon, verspermanĝon kaj ĉambregon kun piano por niaj renkontiĝoj. Ni ofte kaj longe kantis, akompanitaj de bonega pianisto Stefan Lepping. Ni uzis la kantolibron ADORU, kiu estas vera himnaro esperanta, enhavante kristanajn kantojn de multaj

landoj kaj diservajn liturgiojn de pluraj kristanaj konfesioj. Kelkfoje ni eĉ spontane kantis plurvoĉe, ekzemple la kantojn de Taizé.

La biblia temo estis “La leteroj de Petro“. Pastro Wolfram Rohloff prelegis pri tiuj du leteroj de la Nova Testamento. La skribisto konsilas la servistojn submeti sin al siaj sinjoroj, kaj la edzinoj submeti sin al siaj edzoj. Kompreneble, ni multe pensis kaj diskutis pri la tiama kaj la hodiaŭa signifo de tiuj konsiloj.

Alia temo komencis kun ludo: Ni vidis kaj aŭskultis jutuban filmeton kun kanto germana kaj subtekstoj esperantaj. Poste, ni pripensis kiam ĝi estis farita. Rapide ni konsentis: post 1982, ĉar Helmut Kohl, kanceliero de tiama okcidenta Germanujo estas menciita, kaj antaŭ 1988, ĉar Franz-Josef Strauß, ŝtatestro de Bavarujo, estas menciita kiel persono vivanta. Vere, oni



Kelkaj partoprenantoj antaŭ la Nigra Pordego.

faris la kanton dum la jaro 1986. Pastro Rohloff klarigis ke tiel, oni pripensis kiam la leteroj de Petro estis skribitaj. La teksto aludas al la morto de Simon Petro, do alia kristano aŭ aliaj kristanoj skribis la leteroj poste, sub la nomo de Simon Petro. Tio estis kutimo en la antika kulturo. Oni ne faris tion por trompi la legontojn. Tiuj, kiuj decidis, ke la leteroj de Petro estas parto de la Nova Testamento, bone sciis pri tiu fakto. Tamen, ili konfidis ke la Sankta Spirito helpis tiu kristano aŭ tiuj kristanoj skribi la leterojn, kaj ili opiniis ke la leteroj de Petro estas legendaj, aŭ eĉ legendaj. Post la bibliaj tagoj, mi konsentas kun ili!

Ni havis du diservojn: la unuan nur por ni en nia ĉambrego kun protestanta liturgio kaj eŭĥaristio. La dua, dum la dimanĉo, estis la publika diservo katolika en la preĝejo St. Paulinen. Ĝi estis en germana lingvo, sed ni legis antaŭe la bibliajn tekstojn esperantajn, kaj havis tekstojn esperantajn por la kantoj. Cetere, pastro Rohloff tradukis la propetan preĝon.

Dum la tri posttagmezoj, ni estis turistoj. Dum la jaŭdo kaj la sabato, Matthias Ulrich gvidis nin piedirante al vidindaĵoj de Trivero, inter ili malnovvegaj konstruaĵoj romaj kaj belegaj preĝejoj. Por vendreda posttagmezo, li preparis ekskurson per trajno al Luksemburgo. Ni vidis parton de la urbocentro, grandan muzeon, kaj interesan panoramlifton, kiu ligas la surmontan centron de Luksemburgo kun kvartalo en rivervalo.

Por mi, estis preskaŭ miraklo, ke mi povis partopreni, kompreni grandan parton de la prelegoj kaj eĉ diskuti esperante, lerninte la lingvon nur dum duona jaro. Mi ne lernis tage kaj nokte, sed kelkfoje dum mia libertempo. Kompreneble, mi faris multajn erarojn, sed la aliaj, ofte esperantistoj depost multaj jaroj, estis ege helpemaj. La ideo de Zamenhof vere plenumiĝis: *Oni povas lerni rapide esperanton ne nur por diri kaj kompreni kelkajn simplajn frazojn, sed por lerni kaj diskuti pri temoj interesaj!*

☪



Vesperaj dialogoj.

# Maria Magdalena

## Sonoriloj en Zöblitz preĝejo

Wolfram ROHLOFF, DE

**K**araj gefratoj, kelkaj el Vi jam vizitis la preĝejon de Zeblico (germane Zöblitz) dum Kristana Kongreso. Aliaj aŭdis kaj foje ankaŭ vidis la sonorilojn dum niaj Internaciaj Retaj Diservoj en Esperanto (IRDE). Nuntempe ni havas zorgojn pro la sonorilejo kaj ĝiaj tre malnovaj sonoriloj el la jaroj 1475, 1476 kaj 1710. Dum la plurjarcenta, ĉiutaga uzado kaj speciale dum la mondaj militoj, ili parte damaĝiĝis. Ĉar ni deziras, ke ankaŭ niaj pranepoj ilin povos aŭdi, ni komencis plani restaŭradon kaj de la sonoriloj kaj de ilia baroktempa, ligna sonorilejo.

Mi ĉi tie kaptas la okazon, prezenti al Vi nian duan plej maljunan sonorilon, kiu ekde la jaro 1476 vokas en nia urbeto al preĝo. Tiu ĉi sonorilo havas germanlingvan enskribon: “In der ere scta maria magdalene T nach christi geburt m cccc lxxxvi“, do: “Je la honoro de Sankta



Maria Magdalena T [= T-forma kruco] [en la jaro] post naskiĝo de Kristo 1476“.

Do ĝi estas dediĉita al Maria Magdalena. Sed kiu estis tiu virino? Kaj kial la sonorilo estas dediĉita al ŝi? Ni komencu per la dua demando:

Ni iru al la Centra Mezepoko: Germanio eble duona jarcento antaŭ la Reformacio estis unu el la plej piaj landoj en tuta Eŭropo. Jes ja, multon en kaj ekster la videbla, sankta, kristana eklezio kritikadis laikuloj, gemonaĥoj, sacerdotoj kaj episkopoj senvualite. Per akraj vortoj oni akuzis misagojn sed tamen ĉiam konsciis, ke ĝi estas kaj restas tiu ununura eklezio, kiun Jesuo Kristo mem fondis kaj sanktigis. Li ankaŭ ĝis al la plej lasta tago de la mondo portos kaj eltenos tiun eklezion, por tiel donaci al ni benon kaj savon.

Niaj prauloj sin mem rigardis multe pli memkritike ol ni nin hodiaŭ. Preskaŭ neniu, kiu “pilat-ecce” “lavas siajn manojn en senkulpeco” (laŭ Mt 27,24). Ĉiuj sin mem rekonas kiel pekuloj kun pezaj ŝuldoj. Tial la artistoj de la Centra Mezepoko pentrante la Plej Lastan Juĝon starigas imperiestrojn, episkopojn, princojn, papojn kaj normalulojn sur ambaŭ flankojn de la juĝanta Kristo, sur la flankon kaj de la savota kaj de la kondamnata homaro.

*Kie*, ili sin demandis pentrante kaj rigardante, *kie mi staros, kiam Kristo*



*ankaŭ min vokos, por ke mi respondecu pri mia vivo kaj faro? Mi volas ripeti la saman demandon sen religiecaj vortoj: Kio estos, se mi en miaj plej lastaj spiroj enmondaj, antaŭ la fino de mia vivo ekkonsciigos, ke mi sence disipis mian vivon, kio tiam?*

La religieco de la Centra Mezepoko kompreneblas kiel profunda voko je sencplena vivo. Des pli graviĝis por niaj antaŭuloj bibliaj ekzemploj, en kiuj ili retrovis sian propran vivon. Kaj jen Maria Magdalena! Al ŝi Kristo donis duan ŝancon!

En Mezepoko homoj opiniis, ke Maria Magdalena estis antaŭe prostituitino, granda pekulo. Kiam Jesuo elpelis el ŝi sep demonojn kaj ŝin liberigis de la malbono en ŝia vivo, ŝi dankeme, savita kaj pentoplenta pri ŝia ŝuldo migradis kun Jesuo al Jerusalemo. Ŝi eĉ restis apud Jesuo sub la kruco kaj fariĝis la unua atestanto de lia resurekto. Poste ŝi en multaj landoj predikis nian homamantan Dion.

Kaj tial verŝajne nia sonorilo en la 15a jarcento estis dediĉita al Maria Magdalena. Per ĉiu sonorado ŝi vokas ĉiun al pento kaj reiro al la fonto de la vivo, revokas al vivo kun Dio: *Sole ĉe Kristo Vi trovos tion, kiu donas sencon al Via vivo!*

En la antaŭa parto mi skizis, kial en la jaro 1476 la sonorilo estis dediĉita al Maria Magdalena.

Eble eĉ nia preĝejo estis origine dediĉita al Maria Magdalena. Sed bedaŭrinde pri la origina patroneco ne plu ekzistas dokumentoj. La hodiaŭa nomo de la preĝejo estas *Urba preĝejo Zeblico*. Povas esti, ke Kaspar el Berbisdorf, kies familio ekde la komenco de la 15a

jarcento estris la apudan kastelon Laüterstein, la urbetojn kaj vilaĝojn Forhheim, Lippersdorf, Zeblico kaj ĉirkaŭon, en ŝi rekonis sian patronon kaj ekzemplan kristanon. Cetere Maria Magdalena estas ja ankaŭ unu el pluraj patronoj por minejoj, kiuj ja ekzistis multoble en nia ercmontaro.

Sed kia estis la historia, la “vera” Maria Magdalena?

La plej malnovaj kaj fidindaj informoj pri ŝi troveblas en la Nova Testamento. Maria, hebree Mirjam nomata, estis juda virino el **Magdala**, malgranda urbeto apud la okcidenta bordo de la Tiberias Lago. Maria estis tiom ofta nomo, ke oni ŝin distingis per kromnomo de la aliaj Maria-oj: **Magdalena**, do ino el Magdala.

Pri Jesuo ni scias, ke li vokis multajn virojn kaj virinojn, eĉ geedzajn parojn sekvi lin. Iam, ĉirkaŭata de amaso da siaj anoj, li demandis (Mk 3, 33–35):

33 *Kiuj estas mia patrino kaj miaj fratoj?*

34 Kaj ĉirkaŭrigardante tiujn, kiuj ronde ĉirkaŭ li sidis, li diris: Jen mia patrino kaj miaj fratoj!

35 *Ĉar kiu ajn faros la volon de Dio, tiu estas mia frato kaj mia fratino kaj mia patrino.*

Kie en la evangelioj la nomoj de gedisĉiploj de Jesuo estas listigitaj (ekzemple Mk 15,40s), je la unua loko kutime estas inter la virinoj Maria Magdalena kaj Petro inter la viroj. Kaj jam en Galileo ŝi apartenis al la sekvantaro de Jesuo kaj “servadis al li”.

Luko mencias (Lk 8,1–3), ke Jesuo liberigis ŝin je sep demonoj. En posta

tempo tiu mencio kaŭzis multajn supozojn, al kio eble alludas Luko ĉi tie. Mi supozas, ke Jesuo ŝin sanigis je grava malsano kaj ŝi poste lin sekvis, kiel pli poste ekzemple ankaŭ la sanigita, antaŭe blinda Bartimeo el Jeriĥo (Mk 10,52).

Por ni graviĝas Magdalena per la Sankta Vendredo kaj Pasko. Kiam Jesuo estis krucumata, liaj (viraj) disĉiploj forfuĝis timante pri sia vivo. Nur Magdalena kaj aliaj virinoj kuraĝis rigardi de malproksime (Mk 10,40) la krucumiĝon. (Golgota situis ne malproksime antaŭ la Jerusalemaj urbaj muroj.) Sed ankaŭ por la virinoj estis risko, ĉar la romianoj ne hezitis ankaŭ krucumi suspektitajn inojn. Tiuj virinoj kuraĝis kaj vidis, kie la korpo de Jesuo estis entombigita (Mk 15,47).

Kiam Magdalena je la Paska mateno frue iras al la tombo por sanktolei (“ŝmiri” Mk 16,1) la mortintan Jesuon, la resurektinta Jesuo sin montras al la virinoj (Mt 28,9). Sed la mesaĝo de la virinoj, ke Jesuo resurektis el la mortintoj, ŝajnis al la viroj ridinda babilado! (Lk 24,11)

(Eble ankaŭ Vi taksas la paskan Evangelion, ke Jesuo resurektis el la mortintoj, fabelo. Sed la informo ke Jesuo sin komence montris efektive al virinoj, sed NE al viroj, kontraŭdiras la penson, ke tiu ĉi historio povus esti elpensita. Virinoj ja estis rigardataj malfidindaj. Kaj neniu sopra romiano fidus al grupo, kiu argumentas per konfeso de virinoj kiel Maria Magdalena, ke mortinto resurektis kaj virinoj lin vidis. Eĉ ja la viraj disĉiploj ne kredis al la inoj!)

Kaj kio poste? Bedaŭrinde la spuroj de Magdalena en la eklezio de Jeru-

salemo perdiĝas (Agoj 1,14). Kio fariĝis el la “Apostolino de la Apostoloj”, kiel oni ĝis hodiaŭ en la Orienta Eklezio respektolene nomas ŝin? – Ni bedaŭrinde ne scias!

Nur post 100 ĝis 200 jaroj estis skribataj verkoj “apokrifaj”, kiuj volas al ni rakonti pli pri Magdalena. Sed ili ĉefe rakontas piajn fantaziaĵojn. (Cetere Magdalena eĉ en tiuj apokrifoj neniam estas la amatino de Jesuo. Tiu fantaziaĵo nur ekaperas en la “historiemaj” romanoj de nia moderna epoko.)

Je 600 jaroj post Kristo Gregoro la Granda en prediko kombinis la historion de pekulino anonima, kies nomon la Biblio ne redonas (Lk 7,36–50), kun la historio de Maria Magdalena. Tiu ĉi, opiniis Gregoro, la Jesuajn piedojn lavis per siaj larmoj, sekigis per sia hararo kaj fine sanktoleis. Tiel ekaperis la impresoj, ke Magdalena antaŭ sia konvertiĝo estis grandega pekulo, ja eĉ prostitutino.

Mi dubas pri tio. Sed alia legendo el la mezepoko plaĉas al mi. En la “Legenda Aŭrea” mi ekscias, ke Magdalena post la resurekto de Jesuo vojaĝis kiel misiisto ĝis al Francio, kie ŝi vivis ĝis sia morto kiel emerito. Ĝis hodiaŭ, oni diras, la mortintaj restaĵoj de la Sankta Maria Magdalena estas konservataj en du francaj preĝejoj.

Estu tiel, kiel ĝi estu! La kuraĝon de tiu ĉi virino mi admiras. Al aliaj ŝi portis la Bonan Mesaĝon. Kaj ĝis hodiaŭ nia zeblica sonorilo rememorigas ŝin vokante: *Sole ĉe Kristo Vi trovos tion, kio donas sencon al Via vivo!*

Lasta rimarko pri la Sankta Maria Magdalena. Mi ja estas luterana pastoro.

Eble Vi miras, ke mi tamen tiom amplekse skribas pri Sanktulo. Ĉu ne Luther malenkondukis Sanktulojn? Ĉu Sanktuloj ne estas tipe romkatolika aŭ ortodoksa afero? La Konfeso de Aŭgsburgo, baza dokumento pri la evangelia kredo prezentita al la imperiestro kaj la granduloj de la imperio en la jaro 1530 en urbo Aŭgsburgo instruas en sia 21a artikolo pri sanktuloj (mia traduko el la latina):

*Pri la honorado de sanktuloj ili [niaj anoj] instruas, ke la memorado de la sanktuloj povas esti proponata, por ke ni ilian fidon kaj iliajn bonajn agojn imitu laŭ la [individua] vokiĝo, kiel la imperiestro povas imiti la ekzemplon de David, kiam li militas por elĵeti la Turkojn el la patrujo. Ĉar ili ambaŭ estas reĝo[j]. Sed la [Sankta] Skribo ne instruas alvoki sanktulojn aŭ peti helpon de sanktuloj, ĉar ĝi proponas unu-n por ni, Kriston, kiel interulo, repacig-*

*anto, peranto kaj interpaciganto. Tiu ĉi estas alvokenda kaj promesas, ke li elaŭdos niajn preĝojn kaj tiun ĉi kultadon [li ankaŭ] pleje bonvenigas, nome ke li estu alvokata en ĉiuj afliktoj. La epistolo de Johano ĉapitro 2 [versiklo 1]: Se iu pekas, ni havas Advokaton ĉe Dio ktp.*

Do: Ni honoru la sanktulojn, por ke ni lernu el iliaj ekzemplo kaj fido, same firme fidi al nia Dio!



Ligilo kaj QR-kodo al filmo pri la Zeblica sonorilejo



<https://tinyurl.com/yn5rhcz>

*Mi aŭdis pri  
via fido en la  
Sinjoro Jesuo...*

Letero de Paŭlo al la  
Efesanoj 1,15–19

## Internacia virina preĝotago

Interreta kuna preĝo en marto 2023

Raportas Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

**E**n 2023 la liturgion de la internacia preĝotago aranĝis kristanaj virinoj de Tajvano. Estas multaj kristanaj eklezioj en tiu ĉi insula lando, kaj ili kortuŝe kunlaboris, kiel ili mem skribis:

“La procezo de kunlaboro kreis ŝancon por reciproka interŝanĝo kaj dialogo por strebi al la

unueco de fido kaj amo. Kvankam ankoraŭ ekzistas diferencoj de opinioj pri politikaj kaj sociaj aferoj inter malsamaj konfesioj, la kristana fido kondukis nin venki la abismojn de etneco, historiaj vundoj kaj realvivaj malkonsentoj por labori kune por la evangelio, je kiu ni kredas.”

Tra la hungara lingvo mi (Ágnes Ráczkevy-Eötvös) esperantigis la tekston, kontrolis la tradukon Pavol Petrik (SK) kaj Bengt Olof Åradsson (SE), la kantojn elektis Albrecht Kronenberg (DE) – do jam la preparado estis internacia!

Per la uzado de interreta programo por retaj kunvenoj (nome Zoom) ni, kristanaj esperantistoj, povis partopreni en tiu ĉi bela tradicio ankaŭ ĉijare.

Legado el la letero de Paŭlo al la Efesanoj 1,15–19; (GB):

“Mi aŭdis pri via fido en la Sinjoro Jesuo kaj pri via amo por ĉiuj sanktuloj. Tial senĉese mi dankodiras kaj mi primemoras vin daŭre en miaj preĝoj. La Dio de nia Sinjoro Jesuo Mesio, la Patro de l’ gloro, donu al vi spiriton de saĝeco kaj revelacio por koni Lin vere. Li lumigu la okulojn de via koro tiel, ke vi vidu kiel granda estas la espero, al kiu Li vokas vin,

kiel riĉa la gloro de Lia heredaĵo *meze de l’ sanktuloj*, kaj kiel abunda Lia potenco super ni, fiduloj.”

Paŭlo dankis al Dio pro la maniero, kiel la Efesanoj vivis sian amon kaj kredon. Li preĝis, ke ili ricevu la spiriton de saĝeco kaj revelacio kaj plene “konu Dion” per la lumiga laboro de la Sankta Spirito!

Ni ofte estas frustritaj pro niaj malfacilaĵoj kaj obstakloj. En tiaj tempoj ni povas perdi esperon kaj fidon kaj anstataŭe fidas je nia malforta homa naturo. Kvankam ni estis invitetaj meti nian “esperon” en la regnon de Dio kaj alkrōiĝi al la promesoj de Dio per nia fido. Per la lumiga potenco de la Sankta Spirito ni vidas, kiel fidelan, aman kaj kompateman Dion ni havas.

La aŭtoro de la letero al la Efesanoj preĝas senĉese, ke liaj legantoj komprenu, kiom larĝa kaj longa, alta kaj profunda estas la amo de Kristo. Ni povas respondi al ĉi tiu nemezurebla amo, se ni volas vivi ne plu por ni mem, sed por Dio. La amo de Kristo povas esti malkaŝita per niaj agoj, per kiuj ni povas montri la gloran kaj abundan heredaĵon, kiun ni ricevis en Kristo!



Kelkaj partoprenantoj en la reta preĝkunveno.



La prepara komitato.

En la okuloj de Dio ni ne estas pecoj de konfetoj blovataj de la vento, flugantaj tien kaj reen, sed ni estas kiel neanstataŭeblaj pecoj de puzzle. Niaj sociaj fonoj estas malsamaj, niaj kulturoj estas malsamaj, tamen ni estas unuigitaj en Jesuo Kristo.

### Konfesaj preĝoj:

Nia pardonema Sinjoro, ni konfesas niajn pekojn al Vi, ĉar ni ofte pekas kontraŭ Vi. Pro niaj preterlasoj ni ne sufiĉe prizorgis la teron konfiditan al ni, ni uzis la naturon maljuste, malpurigis la medion kaj kaŭzis la malaperon de diversaj bestoj kaj plantoj.

*Sinjoro, kompatu nin!*

Kompatema Dio, ni estas egoismaj kaj fieraj. Ni ne zorgas konservi la dignon de niaj kunhomoj; ni ignoras la rajtojn de minoritatoj, migrantoj kaj enmigrintoj. Per nia preterlaso ni pliigas la suferon kaj premon de la mizeruloj ĉirkaŭ ni.

*Ho Sinjoro, kompatu nin!*

Dio, vi estas fidela kaj vera. Pardonu nin, purigu nin de niaj pekoj, kaj helpu nin vivi en la lumo! Donu al ni la saĝon rekoni vian volon, fidi vian gvidadon kaj tiel pleniĝi de fido kaj amo! Montru vin

al ni, por ke ni ekkonu la senmezuran grandecon de via potenco!

*Amen.*

### Porpetaj preĝoj


Nia kompatema Dio! Nuntempe Tajvano estas en batalo de grandaj potencoj. Ĝi estas internacie izolita jam dum jardekoj. Kvankam la internacia komunumo oficiale ne agnoskas ĝin, Tajvano faris sian eblon por helpi la mondon en agrikulturo, teknologio, medicino kaj humanitara helpo.

Ho Dio de Sankta Spirito, bonvolu doni forton kaj saĝon al la popolo de Tajvano por alfronti la necertan estontecon!

Ni fidas al Vi, ke Tajvano povas resti beno por la mondo. Dia Konsolanto, Vi estas la Sinjoro de la mondo; ni alkroĉiĝas al Vi, ni transdonas nin al Vi, kaj ni metas la popolon de Tajvano kaj la sorton de ilia lando en Viajn manojn.

Ni petas Vin protekti nin, ĉar ni estas malfortaj en ni mem! Vi estu nia protekto kaj forto!

Nia Kreinto Dio! Ni dankas, ke Vi donis al ni ĉi tiun mirindan mondon, riĉan je naturaj rimedoj. Ni bedaŭrinde ofte ignoris la krion de nia Tero, kaj nun ni



La artistino, Hui-Wen HSAIO faris la frontan pentraĵon.

devas alfronti gravajn ekologiajn problemojn, kiel la poluado de niaj aero kaj akvo, la amasoj da rubo kolapsantaj sur nin, la dezertaj montetoj kaj la granda ŝanĝo de klimato.

Dio de la vivo, via boneco plenu niajn korojn; konduku nin saĝe prizorgitan restantan teron!

Nia amata Dio, Vi kreis nin laŭ Via bildo kaj nin benis. Vi vidis, ke ĉio, kion vi kreis, estas bona. Ni preĝas por knabinoj, virinoj kaj viroj, kiuj alportas amon kaj justecon al la mondo.

Sankta Spirito, donu al ni saĝon por batali por la margenuloj, la prematoj, la malriĉuloj kaj la senhelpuloj; donu al ni la kuraĝon paroli por ili!

Igu niajn gvidantojn por fari nian mondon pli sekura loko por virinoj kaj infanoj!

Sekvontjare niaj fratinoj, kristanaj virinoj de Palestino, preparos la preĝon.

☩

**Gratul-ojn**



Honora medalo 2023.



Pavel Polnický estas honorata. Fotis Z. Formánková.

**L**a 4an de marto okazis la tradicia festo de Tago de Poděbrady. Dum la aranĝo en Teatro Pavel Polnický ricevis, okaze de sia vivjubileo, honoran medalon. Oni aprezis lian longjaran aktivadon en esperantista movado, popularigo de baneja urbo kaj laboro en loka turisma klubo kaj evangelika eklezio. Sur la foto estas kun li la urbestro de Poděbrady. ☩

# Mia vivo kun Esperanto

Petro CHRDLE, CZ  
chrdle@kava-pech.cz

**T**iun titolon havas mia ĵus finita libro en kiu mi priskribas mian Esperanto-karieron ekde la komenco, kiam mi renkontis Esperantom erare, ĉar mi komprenis la promeson, ke Esperanto kunigos nin kun la tuta mondo ke Esperanto estas iu nova teknika rimedo, eble mi antaŭvidis interreton.

La verko havas 4 partojn: La unua montras kaj seriozajn kaj gajajn momentojn el mia Esperanto-vivo, la dua enhavas elektitajn fragmentojn el miaj verkoj kaj iujn artikolojn el diversaj gazetoj (ankaŭ unu el Dia Regno), la tria mian elektitan bibliografion rilate al Esperanto kaj la kvara specimenojn de la libroj eldonitaj de mia eldonejo vicigitaj laŭteme. Interesiĝantoj pri la libroj de mia eldonejo KAVA-PECH trovos ĉiujn ĉe <https://kava-pech.cz/esperanto>.

Dek paĝojn forkonsumas mia konfeso pri iom stranga evoluo de mia spiritalia vivo, kiun mi titolis *Esperanto kaj mia kredo-nekredo*. En ĝi mi prezentas la


infanecon en ekumena familio (patrino katolika, patro husana eklezioj), ateisman periodon de mia vivo, revenon al la eklezio de mia patro, pliaj priduboj, ĉu tio estas la spiritualeco, kiun mi serĉas, mian partoprenadon de kristanaj aranĝoj, sed ankaŭ kiel mi organizis ekumenajn diservojn dum nereligiaj eventoj. Miajn dubojn iom trankviligas la vortoj de sankta Paŭlo: *Elprovu ĉion; tenu firme tion, kio estas bona*.

La ĉapitron mi finas jene: *Tamen, mi plu restas fidela membro de KELI, partoprenadas la ekumenajn diservojn en Esperanto (la lastan ene de la UK en Montrealo) kaj ĝoje renkontiĝadas kun miaj kristanaj amikoj kun la espero, ke iam mi plenkore revenos al la kredo de miaj gepatroj. Ĝis nun mi estas tie nur duonkore eĉ ne sciante, ĉu mi povas nomi min kristano aŭ ne.* ❧

Legu pli: <https://kava-pech.cz/esperanto>  
<https://eventaservo.org/e/9a6edd>



Titolpaĝo



Ekumena diservo dum OSIEK 2003 en Prago. Fotis P. Chrdle.

# Krist' Jesuo al ni naskiĝis

## KYRIE-Litanio (flandra)



S: 1. Krist' Je - su - o al ni nas - ki - ĝis  
2. Krist' Je - su - o por ni su - fe - ris,  
3. Krist' Je - su' el la tomb' le - vi - ĝis,



el Ma - ri - a la Vir - gu - lin'.  
do - nis sin sur la kruc - al - tar'.  
i - ris al la ĉi - e - la glor'.



K: Krist' Je - su - o, Fil' de hom',  
Krist' Je - su - o, Di - Ŝa - fid',  
Krist', Sin - jo - ro, Fil' de Di',



Vi nin kom - pa - tu, Vi nin kom - pa - tu.  
Vi nin kom - pa - tu, Vi nin kom - pa - tu.  
Vi nin kom - pa - tu, Vi nin kom - pa - tu.



Krist' Je - su - o, Fil' de hom',  
Krist' Je - su - o, Di - Ŝa - fid',  
Krist', Sin - jo - ro, Fil' de Di',



Fi - lo de ho - mo, kom - pa - tu nin.  
Di - a Ŝa - fi - do, kom - pa - tu nin.  
Fi - lo de Di - o, kom - pa - tu nin.

KRIST' JESUO AL NI NASKIĜIS • KYRIE-Litanio • M (Al die willen te kaap'ren varen):  
flandra • E (originale verkita kiel kontrafakturo): Albrecht Kronenberger 2022-03-24.